

Espero

Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovile et unus pastor » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta ».

ABONEJOJ de E. K.

FRANCLANDO { Ĉe la Direktoro de E. K.
Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, PARIS V°
Ĉe librejo Warnier kaj K°, 46, rue Sainte-Anne, PARIS.

ANGLOLANDO { S-o O. Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, LONDON, W.C.

BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.

BOHEMUJO-AŬSTRIO F. Topič. libr. Ferdinandova 9. PRAHA.

ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI

HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO

ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRINO DE PORDENONE (*Udine*)

HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.

GERMANLANDO : Moller et Borel, 95, Prinzenstr. BERLIN.

POLUJO : Aret. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.

RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. PETERBURGO

SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corrairie, GENEVO.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER

Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur
al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responde nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

KONDIĈOJ DE ABONO

bono jara : { En Francando : 4 frankoj. | **Unu numero :**
 Ekster — 3 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en agosto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn ; — duona paĝo — 2 fr. ; — 4^a paĝo: 15 fr. ; — 8^a paĝo 9 fr. ; — 16^a paĝo: 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj:

Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 46, rue Sainte-Anne, Paris.

MUZIKAĴOJ DE S-INO GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr.
En Songo poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr. 60
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i>	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.....	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski....	1 fr. 25

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(*La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite*). **Artikoloj legindaj en la kolekto :** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj ; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista, ktp. ktp.

BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
<i>(La du verkoj kune mandat'j 0 fr. 75)</i>	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II^a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.....	0 fr. 15
Esperanto ?... Qu'est-ce ?... Franca broŝur. propag....	0 fr. 10

ESPERO KATOLIKA

(HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a, 27-an DE JUN. 1906)

ENHAVO

Progreso Materiala kaj Progreso Morala (Episkopo Bonomelli. — Trad. (Fr. BERNARD)	97
Malantaŭen ! la Scienculoj !	107
Kaprezo (en Italujo). — Verkis J. Meazzini	108
Laboru Ne revu. — Stoward (W. SMITH)	111
Notoj pri vojaĝo cirkaŭ la mondo (Prelato PASQUIER). — Trad. F. GALARD	111
Mi intermiksas !... (Jean DES TOURELLÉS). — (Trad. A. DENONCIN)....	116
La Puno (sekvo). Verkis Luis CARLOS	121
Sakoj	128

Nekapabla respondi al ĉiuj, kiuj skribis al li okzae de Kristnasko kaj Novjaro, la Direktoro de E. K. tie ĉi adresas al ili, kaj al ĉiuj legantoj kaj kunlaborantoj, dankojn kaj bondezirojn plej fervorajn, kvankam iom malfruajn...

La Direktoro de E. K. iom post iom resaniĝas. Li esperas aperigi DU numerojn monate por ke la revuo estu ĝustatempa. Baldaŭ reaperos la ordinaraĵ rubrikoj.

PROGRESO MATERIALA KAJ PROGRESO MORALA (1)

Lia Kardinala Moŝto, via Ĉefepiscopo, invitis min plej insiste por adresi al vi en ĉi tiu tago, kelkajn edifajn parolojn. Mi ekprovis ĉiujn argumentojn por elpreni min el tiu honorega invito : tute mankas la preparado ; mia voĉo estas kvazaŭ ribela ; tie ĉi estas miaj respektgindaj kunfratoj, kiuj tion farus pli bone ol mi. Tiujn kaj aliajn kaŭzojn mi diris kaj ripetis ĝis preskaŭ la lasta momento. Sed ĉio estis senutila ; lia Moŝto volis ke mi supreniru en ĉi tiun katedron. Persisti en mia rifuzo estus estinta pli ol manko de ĝentileco ; mi klinis la kapon, mi akceptis, kaj tieĉi mi estas, fratoj, antaŭ vi.

Kaj nun, tiel senprezare, kiun temon devas mi elekti ? Tiun, kiun inspiras al mi via glorega urbo ; tiu, kiu sin prezentis,

1. Parolado de Lia Episkopa Moŝto BONOMELLI ĉe la provinca Koncilio de Milano, la 2-an de septembro lasta, publikigita en la *Rassegna Nazionale*. — Traduko franca troviĝas en *Revue du Clergé Français*, 15-an de novembro.

Ne forgesu uzi la Abonilon enmetitan en la decembra N-o ;

al mia spirito, kvazaŭ fulmo, kiam mi eniris tiun ĉi belegan katedran preĝejon. La progreso *materi*ala estas bona kaj bonega afero; sed, por ke ĝi estu afero bona kaj bonega, ĝi devas esti sanktigata kaj gvidata de la progreso *mora*la. Tio estas la objekto de la nemultaj paroloj kiujn mi diros al vi, tiajn, kiajn mia spirito kaj mia koro metos ilin sur miajn lipojn.

I

Kiu ajn, precipe en ĉi tiuj tagoj, venas Milanon, aŭ parolas pri Milano, kuras per la penso, kaj kvazaŭ nevole, al ĝia ekspozicio, pri kiu ĉiuj parolas, kiun ĉiuj admiras kaj laŭdegas? Mi ne ŝanceliĝas tion diri: ĝi estas la plej belega triumfo de l'laboro, de l'artoj, kaj ankaŭ de l'scienco, ĉar la laboro kaj la artoj necese supozas la sciencan, tiel, kiel la verko supozas la penson kaj la volon kiu ĝin efektivigas. Antaŭen iras la scienco, altigante kaj svingante sian lumegon; sekvas la laboro kaj la artoj, en iliaj plej diversaj formoj. Jen estas la progreso materiala, kiu kunigas kaj sintezigas ĉiujn formojn de la laboro kaj de l'artoj; jen estas via mirinda ekspozicio, kiu estas la inda kronado de ili.

Mi imagas arbon kiu etendas siajn senombrajn, nevideblajn radikojn, tiras de l'tero la sukcon vivan kaj samtempe pli altigas sian altan pinton, kaj per siaj folioj trinkas la roson kaj la lumon de l'suno. De kie devenas tiuj floroj, tiel ĉarmaj kaj bonodoraj, tiuj fruktoj, tiel belaj kaj bongustaj? Kiamaniere plibeligus tiu arbo, kaj fariĝus io tiel belega kaj majesta. Tio estas la rezultato de la longa kaj lerta laboro de l'ĝardenisto, de la radikoj kaŝataj, de la folioj, de l'aero, de la lumo, kaj de la elementoj ĉie dissemataj, kiuj silente produktas, kolektas, kunigas tie la klopodojn de monatoj kaj jaroj.

Via ekspozicio estas tiu arbo vere mirinda, al kiu alportis sian kunhelpon, ne nur ĉiuj Italaj provincoj, sed ankaŭ ĉiuj Eŭropaj nacioj, fratiĝante plej feliĉe en tiu komuna klopodo.

Ĉia laboro aŭ arto, de la plej humilaj, ĝis la plej altaj la plej belegaj, montras kiajn mirindegaĵojn povas efektivigi la homa genio, kunigita kun la persisteco de l'volo.

Multaj abonoj komenciĝas en januaro. Vidu la daton de via abono.

Trairante tiujn domojn, tiujn galeriojn, rigardante eĉ nur trakure, tiujn sennombrajn mirindaĵojn, verkojn, ĉiuj, el la homa mano, ni estis miregigataj, kaj el nia buŝo elkuris tiu krio Por t' u multimega Jafet'a raso, ĉio estas ebla, kaj la triumfo de l' progreso atingis nun la supron.

La ĉefa merito de tia triumfo apartenas al tiu ĉi urbo kiu, per sia feliĉa situacio, per siaj riĉaĵoj, per siaj spiritaĵoj kaj koraĵoj, fine, per siaj tradicioj, estas l' animo kaj la reĝino de l' Alta-Italujo. Dum la mezepoko, ĝi tenis alte la flagon de l' nacia sendependeco, kaj, kolektante ĉirkaŭ si la Lombardajn urbojn, ĝi forpelis la fremdulon trans la Alpoj. En la sekvantaj kaj al ni pli proksimaj tempoj, kun diversaj ŝancoj, ĝi ne malpli brave plenumis sian mision, kaj en la granda laboro de la nacia sendependeco kaj unueco, ĝi ĉiam havis la plej grandan parton. Kaj kiam la nacia sendependeco kaj unueco fariĝis akirita fakto, Milano *estis*, Milano ankoraŭ *estas*, la iniciatoro kaj nelacigebla propagandisto de l' progreso, kiu, el ĝi, kiel el sia centro, ekradias sur la tutan Italujon.

Mi estis dudekkvarjara, kiam, la unuan fojon, mi vidis Milanon. Mi malklare memoras ĝiajn precipajn stratojn kaj, speciale, vian katedran preĝejon, kiu, ekstere rigardata, ne suferas komparon. Tiam, ĝi estis embarasata per humilaj konstruaĵoj kaj butikoj, bedaŭrinde apogitaj al ĝiaj flankoj. Nun, post duoncentjaro, jen tuta Milano mirinde aliformigita, refarita, plibeligita, pligrandigita, kapabla vetbatali kun la plej homplenaj urboj de Eŭropo ; kion mi diras ? eĉ kun pli ol unu el ĝiaj ĉefurboj .

Kioma progreso en tiu lasta periodo de tridek aŭ kvardek jaroj ! Kiom da bonfarantaj institucioj ! Kia vivo kaj movado en ĝia industrio, en ĝiaj produktaĵoj ! Por ni, kiuj estas maljuniĝintaj, kaj povas kompari inter la estinto kaj la estinto, tio estas progreso, kiu alproksimiĝas al miraklo.

Kaj tiu progreso etendiĝas el Milano en la tutan ĉirkaŭlandon, dissemante amon al laboro, mezriĉecon, kiu el ĝi sekvas, — kaj ekscitante noblan superemon en ĉiu branĉo de l' artoj kaj

Uzu la ABONILON por varbi NOVAN abonanton.

de l'industrio. Mi trakuris vian provincon preskaŭ tutan, kaj mi povas diri ke, iamaniere, ĝi tute fumas, estante kovrita per sennombraj fabrikejoj. Dank'al Milano, tute speciale, Alta-Italujo konkuras pri la komerco kaj industrio kun najbaraj nacioj, Franc-, Svis kaj Germanlando. Jen precize kion mi aŭdis antaŭ kelkaj tagoj, kun vivega kontento, el la buŝo de famaj fremduloj : « Dum malmute da jaroj, tiu ĉi urbo Milano faris gigantajn paŝojn sur la vojo de l'progreso. »

Hieraŭ, mi vidis en viaj stratoj la muzikistan bandon de la franca *Garde Républicaine*, kaj mi aŭskultis la pecojn, kiujn ili ludis, kaj mi pensis pri granda poeto de tiu nacio ; mi memoris tiun frazon restintan fama ; « Italujo estas la tero de l'mortintoj. » Ho ! tiu frazo ne plu ripetigos. Nia patrolando povas lokiĝi flanke de sia latina fratino sen sentiĝi humiligata : la Ekspozicio pravas, ke ĝi estas inda de tio.

Kontraŭ tiu materiala progreso, ne disigebla de la progreso spirita, kiu sinteziĝas en la Ekspozicio, kia devas esti nia sintenado, ni katolikoj ? Mi sentas nenian embarason por tion diri kun plena sincereco. Ni ĉiuj senescepte, eksentas veran kaj vivan ĝojon pro tiu progreso kaj ni aplaŭdas ĝiajn iniciatorojn ; sed samtempe ni prenas permeson doni al vi konsilon, kiu pretendiĝas kiel devo por ĉiu homo ĉemanta la patrolandon.

Ni ĉiuj, katolikoj, forte ekĝojegas pri ĉiu progreso, kaj aplaŭdas ĉiujn, kiuj kunlaboras por ĝin efektiviĝi ; kaj kial ? Tial ke ĉiu progreso estas venko de lumo kontraŭ mallumo, de vero kontraŭ eraro, de bono kontraŭ malbono ; ĉiu progreso, en ĉia kampo, estas almito de la spirito kontraŭ la materio, ĝi estas pli larĝa plenumado de l'Dia ordono, kiu resonas al niaj oreloj : « kresku kaj multiĝu, kaj potencu sur ĉiuj kreitaĵoj de l'tero kaj de l'ĉielo. » Tiu, kiu estas malamiko de l'progreso ne scias kion li faras. Li batalas kontraŭ la homa naturo kaj la Aŭtoro de la naturo. Li provas neblaĵon.

Precize parolante, kio do estas efektiviĝi progreson ? Tio estas iri antaŭen, submeti la fortojn de la naturo kaj ĝin fleksi al

Ĉiu abono estas pagota **KOMENCE**, ne **FINE** de l'jarabono.

uzado de la homo, al liaj bezonoj ; tio estas malgrandigi liajn mankojn, dolĉigi liajn dolorojn, kreskigi lian bonstaton, kontentigi liajn rajtajn bezonojn. La malo povas ekŝajni vera al homo de mallonga vidado ; sed li estas oferaĵo de momenta iluzio, li estas simila al tiu, kiu, ofendata de luma radio frapanta subite siajn okulojn, plendas pri la lumo kaj volus ĝin repuŝi, sed poste ĝin admiras, kaj benas ĝiajn bonfarojn.

Jes, ni, katolikoj, en la nomo de l'racio kaj de l'Evangelio, ni benas kaj gloras la progreson en ĉiuj ĝiaj elmontraĵoj, kaj al ĝiaj iniciatoroj kaj apostoloj ni krias Antaŭen ! ankoraŭ antaŭen ! Kaj ĉiam antaŭen ! Eltrovu terojn novajn, esploru novajn ĉielojn, retropaŝigu la ombrojn de l'mistero, portu pli malproksimen la limojn de l'scienco *Excelsior!*

Vi forĵetis viajn ŝipojn kaj kirasŝipojn, veraj naĝantaj urboj, sur la senlimaj oceanoj, maltimante iliajn koleregojn. Vi boris montegojn, kaj sub la eternaj neĝoj flugas senfinaj vagonaroj ; kun la rapideco de l'fulmo, vi transigas la penson per maldika fadeno, kaj eĉ nun sen ia fadeno ; akvoj fluantaj kun iliaj fortoj amasigitaj en faskoj, briligas urbojn kaj vilaĝojn, kaj samtempe vivigas, centope, milope malproksimajn kaj grandedajn fabrikejojn. Eltrovaĵoj sekvas eltrovaĵojn en la mondo de la senfine grandaj estaĵoj kaj plie ankoraŭ en tiu de la senfine malgrandaj ; kaj kun la eltrovaĵoj, la utilaj aplikoj ; kun la utilaj aplikoj, la rapida nekontraŭstarebla aliformiĝo de ĉio, kaj mi ne dubas baldaŭ ekvidi, super niaj kapoj, ŝipojn flugantajn tra l'aeroj kiel ni ilin vidas kuradi sur la supraĵo de l'akvoj.

Ĉio tio, fratoj, estas bela, estas granda, kaj ne senkaŭze glorigas pri tio nia jarcento, kaj mi volonte klinas min antaŭ la fruktodona, nekontraŭstarebla potenco de la homa genio, fajrero de la eterna Saĝo, kreinto de tiom da mirindaĵoj.

Samtempe kiam progresadas la eltrovaĵoj kaj al militaĵoj de l'homa genio, ankaŭ kreskas la kono de la unua kaŭzo, Dio ; kaj certe neniam plie ol hodiaŭ, por tiu, kiu bone malfermas l'okulon, tiu kono brilegis kun pli viva kaj helega lumo. Ĉu tiu uni-

Ĉiu aboninto povas sendigi specimenon senpage al persono abonbla.

verso kun tuta sia progresado ne estas, kaj ne devas esti, ŝtuparo por supreniri al Tiu, « Kiu movigas ĉion, kiu eniĝas en la universon, kaj brilas tieĉi kaj tie kun pli aŭ malpli da lumego. »

II

Kaj nun, fratoj, ne malŝatu se mi aliras al konsiderado de superega graveco.

Neniu, pli ol mi, estimas kaj admiras la progreson materialan kies ĉeestantoj ni estas; sed mi volus ke ĝi servadu al progresado alia, multe pli nobla kaj valora, kiu ĝin altigante, ĝin plibeligus, igus ĝin altege supreniri, sekurigus ĝian daŭradon kaj fortikigus ĝian fundamenton.

Kaj kiu do estas tiu alia progreso, kiu devas kuniĝi kun la progreso materiala, kaj esti l'aromo kiu ĝin antaŭgardos kontraŭ la putriĝo? — Miaj fratoj, mi ne ŝanceliĝas tion proklami, ĝi estas la progreso *morala*.

La progreso materiala, se oni konsideras de proksime, havas rangon de ilo, de rimedo, rilate al la progreso morala kaj tiu ĉi vastigas kaj firmigas la alian.

Pro kio utilas tiu progreso materiala, se ĝi ne igas nin pli justaj, pli sinceraj, pli malavaraj, pli honestaj, pli bonfarantaj, pli sobraj, pli respektemaj por la rajtoj kaj libereco de la alioj? Ĝi povus plimultigi niajn materiajn plezurojn kaj kontentigi la pasiojn, kiujn ni havas komune kun la senprudentaj bestoj; ĝi povus multobligi niajn oportunaĵojn, nin ebriigi per ĉiuj grandecoj, per ĉiuj ĝojoj ĉi-teraj; sed ĝi neniam povus kontentigi tion, kio, en ni, supreniras al la altaĵoj, celas al la senfinaĵo, kaj estas nia vera grandeco. La materiala progreso sola povas nin kapturnigi, momente, kredigi nin ke ni estas feliĉaj, kaj tiam, ĝi ellasas nin en la malplenaĵo, ĝi nin premegas kaj sufokas.

La progreso materiala estas verko de nia spirito, de nia volo, de niaj manoj. Estante nia kreitaĵo, rilate al ni ĝi nature estas malsupera, ĝi estas nia subulo. Nu, ĉu vi volus submeti tion,

Pro pagigo per poŝto au banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

kio estas malsupera? Ĉu vi volus ke tio, kio pensas kaj rezonas, volas kaj ordonas estu submetita al tio, kio nek pensas nek rezonas, al tio, kio ne povas voli, nek ordoni?

Ne, ne, ni, kiuj naskiĝis por esti la anĝela papilio « kiu alflugas al sendefenda justeco », kiuj devas potenci la materion tutan kaj ĝin submeti, ni ne lasos nin post treni de ĝi, ni ne alligos al ĝi nian sorton kaj feliĉecon.

Kaj tamen, fratoj, grandega estas la danĝero, kaj tro multe da niaj fratoj ebriigitaj per la triumfoj de l'progreso materiala, ŝajnas forgesi la progreson moralan, kaj tiel, subakviĝas, por tiel diri, en tion, kio estas videbla, tuŝebla, gustumebla kaj kontentigas la sentojn.

Juna viro kuraĝa kaj maltimema estas dresinta, post longaj klopodoj, vivegan kurĉevalon; ĝoje li eksaltas sur ĝin kaj ĝin ekpuŝas kun plena rapideco, sed li nesingardeme perdas la piedingojn kaj forlasas la bridon; la ĉevalo galoŝas kaj trorapidas sian kuradon; neriparebla katastrofo minacas.

Mi ne volus ke, al nia societo, tiel vivplena, tiel fiera pro siaj materiaj venkoj, alvenu katastrofo simila al tiu de l'juna viro, kuraĝega ja, kaj grandanima, sed nesingardena. Mastro de sia kurĉevalo, li fariĝas ĝia sklavo. La progreso morala do estu la fortika enbuŝaĵo kaj sekura gvido de l'progreso materiala. Se vi disigas la duan de la unua, vi preparas al la societo, frue aŭ malfrue, neeviteblajn ruinojn kaj malfeliĉegojn. En manoj mallertaj aŭ kriminalaj, vi metas armilojn terurajn. Ni plu ne timu hodiaŭ, la sagojn de l'sovaĝuloj, eĉ venenigitajn; ni timu la bombojn kaj la aliajn mortigajn maŝinojn de kleraj homoj, filoj de l'progreso materiala, kapablaj ekfajrigi la kvar angulojn de l'mondo. Al la tiel multaj kaj timegindaj fizikaj fortoj amasigitaj dum tiuj lastaj tempoj, kaj metitaj al la dispono de ĉiu, ni metu la haltigilon de la moralaj fortoj. La *spirito*, la *koro*, la *penso*, la *volo* movigu la langon kaj la brakojn laŭ la justeco kaj vero; la progreso materiala ricevu la leĝon de l'morala. Tie estas ĉia grandeco, feliĉeco vera kaj daŭra de

Rememoru la PREMION promesitan al tiu, kiu varbos UNU abonanton.

l'societo. Renversi tiun ordon, estas enrapidigi la societon en la malordon kaj ĝin puŝi en la profundegajon de l'anarkio.

Kaj nun, kion mi vidas? Lasu al mi plenan liberecon por diri kion mi sentas, kaj kion mi kredas vidi. Mi fervore amas nian societon, mi ĝojas kaj ĝojegas pri ĝia materiala progreso kaj mi sincere deziras ke ĝi ĉiam kreskadu; sed mi timas ke la progreso morala ne estas al nivelo de l'progreso materiala. Se mi ne eraras, inter unu kaj la alia, estas malproporcio, grandega manko de egalpezo, la materiala superas la moralan. La haltigilo de la lokomotivo estas tro malforta, kaj mi timegas katastrofon tiom pli grava, kiom la kurado estas pli rapida. Tiu, kiu falas de malgranda altaĵo povas esti vundata, sed tiu, kiu falas de loko altega, pereas senrimede. Volu Dio fortenti tiun malfeliĉon, kiun mi timegas! Sed estas ja bone atentigi pri ĝi.

Mi neniam diros, ke nia societo troviĝas, rilate al la moralo, malsupre de la societoj, kiuj antaŭ ni vivadis: tio estus evidenta eraro. Rilate al moralo, nia societo estas senkompare pli bona ol ĉiuj societoj, kiuj estis antaŭ ni; sed, ni ĝin konfesu, en kelkaj punktoj ni estas malsupre. Sufiĉas ekmontri unu, gravegan kaj neneigeblan la memmortigon. Hieraŭ ankoraŭ, la gazetoj rakontis la memmortigon de knabineto naŭjara, Tio povas estis nur izola fakto, ĝi tamen estas simptoma. Nia urbo, Milano, povas kalkuli, ĉiutage, tri aŭ kvar memmortigojn, provitajn aŭefektivigitajn, sen paroli pri tiuj, kiujn la ĉagreno de l'parencoj aŭ amikoj kaŝas al publiko. Tiele havas eble Milano, rilate al la memmortigoj, neenviindan honoron posedi la unuan vicon. Tiu morala vundo estis kvazaŭ nekonnata en la estintaj jarcentoj almenaŭ ĝi certe estis tre malmulte konata. En nia epoko ĝi pligrandiĝas ĉiujare, kaj pro neniaj oni alkuras al memmortigo, sen konsideri la gravecon de tiu ago, kvazaŭ mortigi sin nem ne estus mortigi homon, kaj fari krimon pri malnoblan, ol mortigi aliulon. Mi silentas pri la

Sendu HODIAU vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

aliaj profundaj vundoj, kiuj estas inter ni pli larĝe dissemitaj, ol dum la pasintaj aĝoj.

Tutmaniere, nia materiala progreso impérie postulas moralan haltigilon: la virto vera, en la plej larĝa senco de l'vorto, estas tiu haltigilo; necesa kaj sufiĉa por konservi, vastigi kaj bonfarantigi la kreitaĵojn kaj almitaĵojn de la progreso materiala, kiun ni ĉiuj amas kaj volas.

Kaj tiu progreso morala, kiu ĉiam devas esti al nivelo de l'progreso materiala por sekurigi la regadon de l'granda leĝo de l'ekvilibro, — leĝo universala, kiun neniu povas senpune malobei, — devas posedi sian fundamenton firman, ne ŝanceleblan, universalan, egalan por ĉiuj, ion simila al la leĝo de l'altirado, kiu regas la fizikan universon. Tio estas vero pli hela ol la taglumo.

Nun, kio estas tiu fundamento, kie ĝi restas kaj kiamaniere ĝi povas esti trovata? Tieĉi, ĥoro de malklaraj voĉoj, voĉoj de l'kleruloj, alvenas al mia orelo

Tiu-ĉi diras: « La fundamento de l'principo morala estas en la *uti'o*. » Sed kiom da fojoj la utilo estas la inspiranto de l'krimo! Tiun krimon, ĉu mi devas, ĉu mi povas ĝin plenumi? Tiu krias al mi: « La fundamento de l'principo morala troviĝas en l'*altruismo*, tio estas, ĝi konsistas en voli la bonon de ĉiuj. » Tiun bonon, kiel mi ĝin elkonos? Kaj se ĝi estas mala je mia persona utilo, aŭ je la utilo de miaj parencoj? Kaj tia ĝi estas aŭ ŝajnas oftege. — Jen alia, kiu certigas: « La sento de la honoro estas la fundamento de l'principo morala. » La honoro! Kio estas la honoro! Ĉu ĝi estas en ĉio kaj ĉiam efika kontraŭ la utilo, la pasio, eĉ kiam la ribeliĝo kontraŭ la principo morala ne endanĝeras la honoron? La honoro, fundamento de la moralo! Iru do, kaj diru tion al tiuj dekoj kaj centoj da milionoj da homoj, kiuj havas pri la honoro nur palan ideon, se eĉ ian ili havas! — La *konscienco*, jen estas la morala fundamento metita en ĉiu el ni. Jes, la konscienco; sed kiamaniere ĝi formiĝas? Ĉu estas ĝi, kiu faras la leĝon moralan kaj altrudas ĝin al si mem? Sed tiam! Ĝi laŭvole faros kaj altrudos la leĝon, kaj

Ne forgesu uzi la Abonilon enmetitan en la decembra N-o.

okaze ĝin detruos ĉar, en fino, la moralo estus verko de la konscienco.

Se vi fondas la principon moralan sur la sento, amo de l'vero, de l'bono, sur la honoro, sur la homaj leĝoj, sur la prudento individua aŭ opa, eĉ sur la konscienco, kiel superega leĝaro vi fondas ĝin sur sojlo mova; venos la akvoj, blovos furioze la ventegoj de l'pasioj, kaj via morala konstruaĵo estos balaita kiel la sablo de l'dezerto, kiel la pajleto de l'draŝejo. Dum vi metas la fundamenton de la moralo en la homon, aŭ en la homojn, aŭ en iliajn kreitaĵon, kia ajn belajn kaj geniajn, vi ĉiam havos fundamenton ŝanceliĝan, escepte eble por kelkaj eminentaj animoj, fundamenton sen firmeco, kiu, se ni iras al fundo, devenas de pasio aŭ de multaj pasioj; sed, en fino, estas ĉiam pasioj. Kaj vi volas konstrui sur la pasioj *moralon* difinitan por haltigi kaj regi la pasiojn? Frenezeco! Vi konstruas sur la bordon de vulkano!

La fundamento morala, ni komprenu bone, devas esti lokata ekstere de la homo, por ke ĝi superu kaj regu la homon, ekstere de ĉio, kio estas ŝanĝebla, por ke ĝi estu neŝanĝebla kaj ŝirmata kontraŭniaj insidoj kaj atakoj, kie estas la aksiomoj, Sed ekstere de la homo, super la homo kaj ĉio, kio estas submetita je ŝanĝo, mi trovas nur Dion; en Dio do estu la fundamento morala, kiu estas la konservilo de l'progreso materiala.

Kaj kiam mi diras Dio, fratoj, mi volas diri nia Dio, la Dio de l'kalvario, la Dio de l'maljuna Evangelio, Jesu-Kristo. Por ni ĉiuj, katolikoj kaj kristanoj, en la nuna horo, ne povas esti alia regulo morala krom la regulo kristana katolika, la regulo Evangelia, tiu regulo, kies konservanto, tradukisto fidela kaj nedetruenda estas la Eklezio, nia patrino.

Ni ĉiuj, do, kiuj volas la progreson materialan, pri kiu ni estas fieraj, kaj ĝian vastiĝon, ĝian konservadon, ni devas voli la progreson moralan, kiu estas ĝia fundamento, ĝia risorto kaj protekto; tiu progreso morala devas esti fundata sole en Dio, la vera Dio, kaj Dio, la vera Dio regas sur la tero per sia Filo, vera Dio, homiĝita, — per sia Eklezio, kaj prezentas al ĉiuj,

Multaj abonoj komenciĝas en januaro. Vidu la daton de via abono

al popoloj, al individuoj, en ĉiuj landoj, en ĉiuj tempoj, en ĉiuj lingvoj, sian Evangelion, regulo superega, nekomparebla kaj efikega de nia morala konduto

Al ni, homoj de Eklezio, apartenas en la unua vico, a onci kaj klarigi al ĉiuj tiun Dian leĝaron, resumo de la plej sankta moralo, kaj ni tion faros en la mezuro de niaj fortoj. Sed jen belega penso Tertuliana; aŭskultu ĝin « *In causa Dei, unus quisque miles*. En tio, kio rilatas al Dio kaj al lia kaŭzo, (kaj la principo morala estas tute en Dio), ĉiu kredanto, ĉiu homo estas soldato de Dio, kaj devas bataladi por lia kaŭzo.

Vi do, kristanoj kaj laikoj, devas ankaŭ propagandi la necescon de l'principo morala evangelia, hejme en la familia vivo, ekstere en la societa, publika vivo, per la parolo, per la plumo, kaj precipe per la konduto. Ni kunigu ĉiujn vivajn fortojn de la lando, la fortojn publikajn, la fortojn privatajn, la fortojn de la pastraro kaj de la laikoj por la kaŭzo de l'progreso *materiala, morala, kaj religia*, ĉar ili ĉiam estis kaj devas ĉiam esti kunigitaj kaj akordigitaj inter si. La fasko de tiuj tri potencoj, la progreso materiala, la progreso morala, kaj la progreso religia, kondukos nian karan patrolandon al ĝiaj altaj destinoj.

Tradukis Fr. BERNARD. (El la Fratoj de katolikaj Lernejoj).

MALANTAŬEN ! LA SCIENCULOJ !

Kian la revoluciistoj devigis la faman Lavoisier (Lavuaĵe) supreniri sur la eŝafodon, oni respondis al la scienculo petanta ke oni lasu al li almenaŭ tempon necesan por elsolvi problemon : « Respubliko ne bezonas scienculojn ! »

La francaj regantoj, kiuj uzas la « sekŝan » gilotinon, ŝajnas same konsideri la scienculojn, kiuj ne estas anoj de la « bloko » !

Jen ekzemplo. En la Malgranda Seminario Sankta-Celesteno, en Bourges (Burĝ), estis fondata la observatorio, nune tre konata ĉe la scienculoj sub la nomo « Burĝ'a Observatorio ». La estro

Uzu la ABONILON por varbi NOVAN abonanton.

de tiu ĉi estas Pastro Moreux, Sekretario de la meteorologia posteno de Centra Francujo, kaj universale konata.

Kiam la Franca registaro *prenis* (eŭfemismo austataŭ « *stelis* »!). Pastro Moreux petis tempon necesan por la transloĝigo de siaj observatoriaj instrumentoj. La administracio dankema (!) rifuzis ĉiun prokraston. Oni sukcesis rapide transloĝigi nur disrompante ĉion. Post tia forpelo, Pastro Moreux sendis sian eksigon, kiel Sekretario de la Centra meteorologia posteno.

KAPREZO (Caprese)

Kapreza komunumo enhavanta restaĵojn de historia kastelo, apartenas al la juĝistumo de « Pieve S. Stefano », provinco de Areco (Arezzo). Tiaj restaĵoj de turkastelo kun juĝistejo kaj kun malmute da kastelaj muroj, kuŝas sur la pinto de pentra monteto, kiu de orienta flanko de l'monto « Katenaja » antaŭeniras ĝis dekstra deklivo de torento « Singerna », en gr-o 29°39' long. kaj 43°39' lat. De « Pieve, S. Stefano » ĝi estas malproksima preskaŭ sep kilometrojn, kaj preskaŭ naŭ de Kiuzo (= Chiusio). La teritorio ĉirkaŭprenas spacon da 6690 hektaroj kies 270 okupas fluantaj riveroj kaj vojoj ; kaj en ĝi oni povas kalkuli du milojn da loĝantoj.

La « Singerna » ĉefalfluanto de Tevero, estas plej granda rivero kiu banas Kaprezan valon antaŭe per subitaj kaj poste per dolĉaj serpentmovadoj ĝi dividas teritorion je duobla deklivo, kie leviĝas verdantaj montetoj kovrataj de plej fortika kreskaĵo da olearboj, vinberarboj, kverkoj ; la kaŝtanarboj enkadras tiun ĉi nekompareblan vidaĵon.

La tieaj vilaĝanoj ĉiuj okupataj pri kampindustrio, kiu provizas ilin je bezonoj de vivo, estas laboremaj, ĝajaj fieraj de nobla kaj grandanima fiereco. La gastecon ili ŝatas kiel devo ; estas devo por ili afableco, kiun ili montras per esprimadoj, kiuj ju pli ŝajnas malĝentilaj en ilia takto, des pli estas harmoniaj en signifo. Ĵaluzaj de sia historio, maljunuloj, knaboj, virinoj konservas viva la tradicion de plej interesaj okazintaĵoj kon-

Ĉiu abono estas pagota **KOMENCE**, ne **FINE** de l'jarabono.

cernantaj ilian kastelon. Popola kanto en oka rimo, kiu kunplektas historion kaj devenon de Kaprezo estas en la buŝo de ĉiuj, riĉa de ideoj kaj plena de gajeco!.. ĉar tiu popolo ŝajne malĝentila pro ĝia soleco, tiel forgesita, amas poezion — ĝi estas poeto en la vera senco de la vorto. Tutajn kantojn de « Tasso » mi aŭdis mem ripeti de personoj kiuj ne eĉ scias legi, lerninte, ilin parkere per monotona kantado de siaj kunmontanoj.

Cetere probraj je la vivo kaj eĉ konstantaj en siaj malnovaj kutimoj kaj kredoj, ili ne estas kapablaj malutili al kiu ajn; ve! tamen al tiu kiu malhelpas aŭ kontraŭstaras iliajn rajtojn; al tiu kiu mokas iliajn religiajn konvinkojn. Tuŝante la bienojn, preskaŭ ĉiu familio posedas sian kampon, sian kaŝtanarbareton; kaj tial la rajto de propreco estas tie pli respektata ol aliloke. La registaro povus ŝpari por ili eĉ la juĝiston pacigantan, ĉar ĉiu Kaprezano ja bone konas tiom da leĝoj kiom bezonas por si mem.

Kaj la virino?... La virino de tiuj ĉi montoj ensorĉas pro sia beleco; ŝajnas ke ŝi volas superi la najtingalon kiu kantas pro amo, flugetante, dum la printempo, sur la arboj aŭ tra floretoj de l'herbejoj, — ofte ŝi nomigas ŝin per nomo de birdo aŭ de floro: sed, afero pli grava, ŝi estas gaje fruktoporta kiel akvo de l'rivereto surverŝante ĉiujn herbejojn kiujn ĝi renkontas. Fine, por mallonge diri, kiu ajn unufoje vizitis tiun landon kredeble neniam forgesos ĝin.

* * *

Oni diras ke Kaprezo estas unu el cent urboj, kiujn la Etruskoj almilitis kontraŭ Umbroj. Tiu lando estas rimarkinda pro la faritaĵoj de « Aghinolfo de Conti Guide », feŭdalulo de tuta valo Kapreza, sed ĝi fariĝis nemorteble glora kiam, en 1475 jaro ĝi donis naskiĝon al tiu, kiu atingis plej altan gradon « *il sublime* » je la pentrado kaj skulptado: Mikaelanĝelo Buonarroti.

En la fortikaĵo Kapreza ekzistas la domo naskiĝa de tiu granda artisto, ankoraŭ nun magistrata domo; kaj efektive, la vizi-

Ĉiu aboninto povas sendigi specimenon senpage al persono abonebla.

tantoj estas tie allogataj de tiu ĉi surskribo je la ĉefpordo de l'kastelo

Inter la ruinigitaj siaj muroj
tiu antikvega kastelo
Ĵaluze gardas por la posteuloj
la lulilon de Mikaelangelo

—♦—
Fieraj nacioj, gloraj urboj
envios
Tian ŝancon.

Plie kiam oni supreniras per ŝtona ŝtuparo, apogata al maldekstra angulo de l'facado kaj kovrita per tegmentaĵo, aperas klare legebla flanko de l'domo, eĉ la jena marmora subskribo, tie lokita je la okazo de la kvara jarcento de l'naskiĝo :

Tie ĉi
la 6-an de marto 1475
de
Ludviko Buonarotti-Simoni
urbestro de Kiuzo kaj de
Kaprezo por la komunumo
de Firenco, kaj de
Franciskino el Sero,
naskiĝis filo kiu nomiĝis
Mikaelangelo

Kaj la jaron 1875-an la
komitato Firenca kun ĝoja
konsento de la popoloj
loĝantaj
inter la fonto de Arno kaj
Tevero tiun ĉi signon de
memoro por solenigi la feston
centjaran
je l'onomo de Italio
Metis.

Suprenirante la unikan etaĝon oni renkontas ĉambron ekstere de kiu oni legas :

En tiu ĉi humila ĉambreto
La 6-an de marto 1875
naskiĝis
Mikaelangelo Buonarotti

Kaj interne

Tie ĉi — plenaj de amo — la artoj plej belaj — al prefera-

Pro pagigo per poŝto au banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

mita infaneto — inspiris — tutan ilian virtuozecon — por ke lia nomo en la centjaroj — sonus — « Michel piu che mortal Angel divino ». (Mikaelo pli ol mortema Anĝelo dia)
(Kun helpo de verketo de Ing. L. Mercanti).

Jakobo MEAZZINI (Firenze) *Reggello*.

LABORU, NE REVU.

Revoj ne nin helpos iel,
Kvankam al ni ofte karaj,
Ili estas vanaj kiel
Pluvo sur la ondoj maraj.

Ni sukcesos laborante.
Sortoj ĉiam malbonuzas
Tiujn, kiuj, ludetante
Inter ombroj, sin amuzas.

Tre rapide tempo pasas,
Se sen celo ni eraras,
Se ni nur fantomojn ĉasas,
Se ni volas, sed ne faras.

Do ni ĉiuj havu celon.
Ni laboru, forte, kore,
Ni, portantaj la verdstelon,
Ĉiutage, ĉiuhore.

Stoward W. SMITH. (El ENFIELD, anglujo).

NOTOJ PRI VOJAĜO CIRKAU LA MONDO EN CINGALUJO

Se vi alvenos, kiel mi, el Tuticorin al Colombo, kaj vi elŝipiĝos je lunlumo; unu horon post la sunkuŝiĝo, vi kredos ke vi eniras en feinan mondon tute malsimilan de nia Eŭropo, kaj de Hindujo kiun vi ĵus forlasis. La trunko de kavigita arbo, kiu vin

Rememoru la PREMION promesitan al tiu, kiu varbos UNU abo-
nanton.

transportos el vaporŝipo al la kajo, al vi ŝajnas barketo difinita por estaĵoj senpezaj. Tamen tri remistoj ĝin movigas antaŭ ol en ĝin vi lokiĝos. Trabo, alligita al ĝiaj flankoj per du stangoj, kiuj tenas tiun ĉi je la interspaco de kelkaj futoj, aldonas ekvilibron. Nenia najlo profanas la lignon de tiu barko ; ŝnuroj el kokosa arbo ligas kaj kunigos ĉiujn pecojn. Per puŝado de la longaj remiloj de miaj tri nigruloj, rapide al la kajo mi alvenas. Tie, sub la lumo dolĉa kaj mistera de la luno, mi ekvidas personojn kun blankaj roboj, kies bronzita vizaĝo plie montras belajn dentojn, okulojn brilajn kaj mirindé malfermitajn. Haroj nigraj kaj tre densaj malantaŭe tordiĝas per eleganta harligaja ; ronda larĝa kombilo, al nigra kaj flava testudaĵo, stariĝas sur tiu harligaja, kaj prezentas siajn du finiĝojn, kiel kornojn, super la frunto.

Tial, ke mi ne vidas barbon, ke la vizaĝoj prezentas delikatajn kaj virinajn trajtojn, ke la tuta korpo ŝajnas maldika, mi demandas min, ĉu antaŭ mi estas virinoj, kaj ĉu en tiu insulo, same kiel en Darjeeling, la *kulia* metio estas difinita por malforta sekso. Kaj ankoraŭ tie-ĉi, kiom tiuj estaĵoj estas pli delikataj, pli virinaj en siaj sintenadoj, ol la fortikaj Tibetaninoj, kiuj kunportas paketojn aŭ ŝtonojn sur la deklivoj de Himalaja ! Tamen la kulioj en Colombo estas ja viroj. Hejme restas la virinoj. Sed kiel gracia, ĝentila, alloganta estas tiu raso de homoj !

La Cingalo kredeble estas la viro pleje kvieta. Mezalta, kun membroj maldikaj, sed harmoniaj kaj flekseblaj, li portas kun tiom da gracieco, sian preskaŭ virinan veston, ke li ŝajnas konsciiĝi pri kio pleje taŭĝas, kiel vestaĵo, por lia naturo. Fenelon' diris al fraŭlinoj de Beauvilliers, ke la ŝanĝiĝo de la modoj estas kontraŭa al ĉiuj principoj de l'gusto, kaj ke, por ĉiu persono estas vesto, kiu sola taŭĝas por la karaktero de individuo, kaj por la koloro de ĝiaj haroj. De jarcentoj la Cingaloj trovis la veston kiu taŭĝas por ilia naturo ; ili estos pravaj ne ĝin ŝanĝantè. La Eŭropaj pantalono kaj jaketo ilin

Sendu **HODIAU** vian abonpagon per poŝtmandato (franca au internacia).

ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesa“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siųsti reikia pagal šio adreso: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

Vilniaus mokyklų klausime.

Pereitą nedėdienį, d. 5 (18) lapkričio per „Viln. Žinias“ sušaukta buvo prie š. Mikalojaus bažnyčios lietuvių susirinkimas, kuriame buvo žadėta duoti liet. mokyklų komiteto atskaitą ir norėta išrinkti naują komitetą. Susirinkimas rods įvyko, bet ne labai skaitlingas, ir, tarytum, negalėjo apsieiti be skandalo, prirengto tokių žmonių, nuo kurių to niekad netikėta....

Iš atskaitos patyrta, kad pereitais metais turėta dvi lietuvių vaikams mokykli; vienon jų, Šnipiškiuose, ėję mokslus apie 16, kiton prie Odminių gatvės, 17 vaikučių. Šitų mokyklėlių likimas buvęs labai apverktinas dėl tulų **sui generis** priežaščių, kurias ir čion paminėti reikėtų. Atskaita labjausiai kaltina lietuvių visumėnę, jos tautišką nesusipratimą, kad ji leido toms mokyklėlems beveik pragaišti nešelpdama jų medegiškai, Antroji priežastis—Vilniaus lenkininkų agitacija, kuri varo visus lietuvių vaikus į lenkomanų mokyklėles pilnas bjauriausio šovinizmo. Ant trečios vietos paminėti reikė-

tų, jog ir paskirtieji prie lietuvių mokyklėlių kunigai lietuviai nesilankę jose, rodos prisidingėję ir ne išguldinėję religijos, kas davė vėl tuliems fanatikams progą garsinti, kad tos mokyklos verčiančias mokinius į bedievius (Sic!). Įdėmiausia pastaroji priežastis— Šv. Mikalojaus bažnytelės klebonas, quasi lietuvis, patsai atkalbinėjęs tėvus neleisti savo vaikus į tą **bedievišką** lietuvių mokyklėlę, nes kitaip jis jiems nuodemių išrišimo neduosiąs..... Teip buvo atskaitose garsinta. Kad garsas apie kun. Kuktos agitaciją prieš lietuvių mokyklėles, regis, bus teišus, rodo ir jo pačiame susirinkime pasielgimas. Jis butent pradėjo kaltinti lietuvius, buk jie bedievyste užsiimą, vaikų nemokimą tikėjimo, kunigo nekviečią susirinkiman ir t. t. Nors vislab tai buvo ne koki tvirti apkaltinimai, bet **tyras melas**, kun. Kukta supykęs ant visų iš susirinkimo išsinešdino. Rods nuo tokio **tautiško šiaudadušio**, kaip Kukta, ko geresnio ir laukti negalima, bet, juo didesnis ėmė visus susirinkime lietuvius gailestis, matant kad toks geras tautietis, kaip kun. Stakelė, prie padidinimo, ir teip jau apgailėtino, skandalo stropiai prisidėjo, bjaurų rinksmą ir pludimą be jokios priežasties pakeldamas.....

Naujo mokykloms komiteto rinkimą atidėta už dviejų savaitių, kada, rasi jau bus atvažiavęs ir naujas prie Šv. Mikalojaus bažnytelės kunigas

Zienis.

Svarbiausieji atsitikimai.

Ministerių taryba svarsto sumanymą apie praplatinimą kai-kurių žydų tiesų, norima, butent, panaikinti visas ipatingas baudas

giminėms jaunųjų žydų, kurie nestojo į kariumenę ir panaikinti apsigyvenimo ribas. Juodašimčiai patyrę apie tai, siunčia prieš tai protestus valdžiai, grąsindami surengsiančią žydams žudynes, jei tik jiems bus kas nors palengvinta.

Žinių-žinėlės.

Vilniuje. Gener. gub. Krivickis išvažiavo Petrapilyn, sako buk dėlei apsvarstymo įvedimo Lietuvoje žiemiečių savyvaldos.

— Į Vilniaus realinę mokyklą lietuvių kalbos mokytoju paskirtas baigusis Peterburgo universitetą p. A. Smetona.

— Neseniai, pagal lenkų rinkimų komiteto sumanymą, buvo lenkių moterų susirinkimas, kurios sutiko dalyvauti priešrinkimų agitacijoje. Iš viso atėjo į 40. žmonių. Nuspręsta išskirstyti miestą tarp savės ir vaikščioti į namus renkant reikalingus agitacijai pinigus.

— Iš žydų rinkėjų progresistų susitvėrė kuopa, norinti praveisti Gruzenbergą nuo Vilniaus į Dumą. Nežiūrint į tą, kad Gruzenbergo kandidaturą pastate ir kadetai, progresistų rinkėjų kuopa nori veikti atskirai nesijungiant su kadetų partija.

Manoma, kad prie tos kuopos prisivienys taipogi kitų tautų progresyviškieji gaivalai.

Kaunas. „Ned. Sk.“ praneša girdėjęs, kad vienas apsigyvenęs Amerikoje lietuvis žada padovanoti Kauno Viešam Lietuvių katalikų knyginei didelį savo knygina (biblioteką), susidedantį iš angliško, lenkiško ir lietuviško skyrių, vertės kelių tūkstančių rublių.

Kalvarija. Garsiosios žudynės įrengėjai p. Ratkevičius ir keli kiti patraukti teisman liko teismo išteisinti.

Petrapilis. Apskelbtas viršausis caro palie-pimas apie pakeitimą kai-kurių įstatymų paliečiančių sodiečių žemę.

— Apskelbtas vidaus dalykų ministerio įsakymas, kurio prasmė tokia: 1) Pasiliauna piniginių paketų priėmimas visose Valstybės pačtose, išėmus Ochotską, Gižigą, Petropavlovską, Markovą ir Beringą, o teipat ir tas geležinkelių stočių valsčiaus valdybas, kurios atlieka pačtos reikalus. 2) Neprisiima piniginiai paketai Suomijos pačtose, kur priima tik perlaidas („perevod“). 3) Tarptautiniai piniginiai paketai priimami, pagal dabar esančių įstatymų. 4) Per pačtą perlaidomis („perevodais“) galima siųsti ne daugiau kaip 5,000 rublių. Perlaidos pinigų suma, kurią paduoda viena valdžios įstaiga ant vardo kitos įstaigos, nėra apribojama. Perlaidų suma, siunčiamą į Suomiją, liekti ta pati.

— Visus dokumentus apie Baltstogės skerdynę buvusių Dūmos sąnarių Jakubsono, Arakancevo ir Ščepkino surinktus, kasžin kas išvogė. Lapkr. 10 d. Taurydos rūmė, Petrapilyje, buvo peržiūrėti visi popieriai, kurie pasiliko nuo Dūmos posėdžių ir kurie nebuvo atiduoti Valstybės Tarybon. Tačiau nei vieno jieškamo dokumento nesurado.

Mohilevas. Miesto taryba atsisakė pašalinti balsuotoją Tverdių, pasirašiusį po Viborgo atsišaukimu.

Kutaisas. Ant važiavusio iš Čiaturė pačtos traukinio užpuolė ginkluoti žmonės. Spėja, kad pavogta 21,000 rublių. Iš kareivių apsaugos yra sužeistų.

Redaktorius ir leidėjas kunigas Juozupas Ambraziejus.

M. Kuktos spaustuvė. Dvercovaja, 4.

aliformigus kaj malbeligus ; se belajn nigrajn harojn ili tranĉus, ili perdus grandan parton de siaj ĉarmoj. La ŝtofpeco, ĝenerale blanka, kiu volviĝas gracie ĉirkaŭ iliaj lumboj kaj defalas ĝis maleolo, liveras veston tre modestan. Ĝi vidiĝas, kiel robo mallarĝa, sed ne pli ol tiu, kiu nuntempe estas laŭmode ĉe la sinjorinoj en Franclando. Ilia ebonkolora busto, ĝenerale tre fleksibla kaj glata, elmontriĝas kaj profiliĝas elegante supre de la robo faldata kaj fiksita al la zono. Blanka busto malplaĉus pro sia ŝajno senvestita.

La Cingalo uzante nek ŝuojn, nek aliajn piedvestojn, paŝadas senbrue. En ĉiuj hoteloj, la servistoj estas tre multaj ĉiu momente oni miras ekvidi je siaj flankoj ridetantajn vizaĝojn de homoj, kiujn oni ne aŭdis dum ili alproksimiĝis. Unu vorto de l'mastro movigas kvin aŭ ses el ili, kiuj kun rideto sur la lipoj estas pretaj por servi al vi ; kaj tiu rideto ĉiam montras blankajn perlojn. Ĉu tio estas koketeco ? Eble ! kaj, aŭkaŭ pro sciemo, ili alproksimiĝos al vi..

Infanoj ili estas ; ili deziras koni kia estas tiu fremdulo, kiu ne estas farita kiel ili, kiu posedas nek ilian lingvon, nek iliajn kutimojn, kiu sin ŝargas per vestoj pezaj kaj netaŭgaj, kaj kies kapo ne konservis la plej belan ornamadon donitan al la homo de la naturo : la hararon. Mi neniam eniris en mian ĉambron ne tuj vidante bronzitan kaj ridetantan vizaĝon de mia servisto, kies kapo estis ornamata per harliĝaĵo kaj kombilo. Katolika Cingalo li estis.

Unu el la ĉefjaj strangaĵoj en Colombo, por la okuloj de fremdulo ĵus alveninta, estas certe la veturada rimedo. De la haveno ĝis la urbo, sur ĉiuj stratoj kaj aleoj de l'parkoj, centoj da brakveturiletoj ŝirmataj per kapoto, treniĝas per nemulte vestitaj homoj, kiuj trotras same kiel ĉevaloj, kies funkciojn ili plenumas. Tiuj veturiloj ne multe kostas unu rupion po du horoj. Sub varmega suno, la nigra trotisto burĝon trenas Eŭropanon, mahometanon, iafoje la laboriston mem. Malgraŭ la malmoleco de sia nigra aŭ bronza haŭto, li ŝvitas. Nokte, en sia veturilo li dormas. Tiujn veturilojn oni nomas *rick-shaws*. La homoj,

Ne forgesu uzi la Abonilon enmetitan en la decembra N-o.

kiuj ilin trenas, ne vivas, laŭdire, en tiu peniga metio, pli ol tri aŭ kvar jarojn. Post tiu tempo, konsumigitaj, ili mortas, kaj la hospitaloj eĉ ne volas ilin akcepti. Kaj la Eŭropanoj elpensis la protektantajn societojn por la bestoj! Por motivi tiun kruelecon oni diris al mi, ke la lacigitaj trotistoj ne estas resanigeblaj. Tiuj homoj estas grandnombre Tamuloj (Tamouls), alvenintaj el Hindujo Cingalujon por gajni vivon, tiun mizeran vivon, kiu estingiĝas post kelkaj jaroj. Mi konas pastrojn, kiuj pro kompato kaj pro respekto por la homa indeco, ne volas uzi *rick-shaw'ojn*. La vero estas, ke aliu povas ilin uzi pro bonfaremo; ĉar la kompatindaj trenistoj de *rick shaw'* havas nur tiun rimedon por vivi, kaj avide petegas klientojn. Kelkaj eltirantaj siajn veturiletojn kaj trotantaj per ritmaj paŝoj, estas agrablaj por vidiĝi: iliaj haroj buklimitaj per nigraj amasetoj, saltas kaj refalas gracie laŭ la movado de ilia irado. Ifoje longaj harligoj flirtas ĝis la mezo de ilia nigra dorso kaj estas jetataj de la vento dekstren kaj maldekstren, miksitaj kun la franĝo de la tuko, kiu ĉirkaŭiras ilian kapon. Tiu franĝo utilas por viŝi la ŝviton de l'vizaĝo, kiam ĝi fluas tiom, ke ĝi malhelpas la vidadon de la trenistoj. Artisto povas trovi profiton ĉe tiu spektaklo. Sed la kompatema koro de bona pastro, povas malfacile akcepti tion, kaj uzi *rick-shaw'iston* kiel vulgaran ĉevalon. Mi sentis min indignanta kontraŭ Eŭropanoj, kiuj allasis al la trotisto nek kompatan rigardon, nek vorton de simpla humaneco.

Tamen, ĉion konsiderante, la specimeno de homa raso, la plej distinginda, la plej delikata, tiu, kiu igas pripensi pri la spirito pli ol pri la materio, pri la animo pli ol pri la korpo, tiu kiu esprimas ekstere plej forte la sentojn, signajn kaŭzojn de nia grandeco, ne estas Eŭropano dika, kun brilaj koloroj sur vizaĝo, kun atletaj formoj, kiu zorgas pri sia digestado per metoda paŝado aŭ per dormiga siesto, sed ĝi estas tiu Cingalo, kun maldika kaj alta busto, kiu posedas nur sufiĉe da korpa materio por liveri ŝirmaĵon kaj ilon al la animo, kaj kies movadoj esprimas videble tion, kio okazas ĉe la parto la plej nobla de lia estaĵo. La besto estas tro forta kaj tro zorgata ĉe la unua. Ĝi

Multaj abonoj komenciĝas en januaro. Vidu la daton de via abono.

estas kaj restas tute submetita ĉe la dua. Tial kiom da fojoj mi estas dezirinta, ke la roloj estu ŝanĝitaj ke, tia peza kaj kunforta ĉarpentaro Eŭropano alligiĝu al la *rick-shaw*, kaj ke Cingalo, kun blanka robo, kun delikata vizaĝo kaj graciaj membroj, sidiĝu ĉe la fundo de la veturileto. Mi rekomendas tiun deziron al la estontaj revoluciuloj, kiuj altrudos al Cingalujonovan konstitucion de la homaj rajtoj.

Estas beleta vidaĵo, vespere, kiam la solaj steloj ornomas la ĉielon kaj anstataŭas lunon por lumigi al la tero, vidi antaŭmetitan blankon sur la ondoj de la maro, laŭlonge de *Gale-Face-Promenade*, la robon de Cingaloj. Pro mi ne scias kio fizika forto, tiu blanka vesto ŝajnas enteni lunon, kaj per si mem lumigi. Ĉu estas efiko de la tute apudaj ondoj? Efiko de l'atmosfera? Cetere, tie-ĉi la lumo estas ĉie, eĉ en la nokto: lumo mistera, kiu ricevas de la nokta silento apartan ĉarmon. Ĉiuflanke flirtas lumaj punktoj, kiuj ŝajnas jen fali de la ĉielo, jen eliri el la maro, jen elspruci el la kokosarboj. Ili estas fosforecaj muŝoj. Kiu povas kolekti centon da ili povus, legi kaj skribi per ilia lumo. Mi sonĝus pri tia vivanta lampo por religi *Paulo kaj Virginio*, la klasikan romanon de la lando de l'kokosarboj, Ĝia dolĉa lumo, miksitaj je mistero, taŭgus por la poeta prozaĵo de Bernardin-de-Saint-Pierre. Cetere la rememoro pri tiu verkisto, kaj la idilo vizitadis mian imagon dum miaj promenadoj sub la kokosarboj de *Dombala-Pitya* kaj de *Mount-Lavinia*.

Multe da humilaj dometoj, sub verdaĵo kaŝataj, al mi ŝajnis indaj por ŝirmi la infanecon de ambaŭ herooj de Bernardin-de-Saint-Pierre. Ian tagon, en Dombala, mi trompiĝis pri vojoj, kiuj similas aleojn de granda parko, en kiu la plej riĉa de l'reĝoj estus plantinta, je grandaj elspezoj, la arbojn la plej maloftajn en la mondo, kaj kie ĝardenistoj ne kompareblaj konservus per multe da oro kaj genio, la florojn kun koloroj plej brilegoj, kaj kun parfumoj plej delikataj. Kia vegetado! mi imagis min erariginta en angulo de l'tera Paradizo. Nenia sufero ĉe la kreskaĵoj: nenia signo pri morto ĉe la arboj. Ĉiuflanke potanca

Uzu la ABONILON por varbi NOVAN abonanton.

vivo : senmanka puŝado de suko, kiu altiĝas, ĉiam altiĝas el la tero al la branĉoj de l'arboj kaj kiu sveligas fruktojn dekoble, dudekoble pli dikajn ol tiuj de Eŭropo. Se kokos-nukso defalus sur la kapon de homo, ĝi premeĝus lin. La frukto de la « jaquier » (artocarpus integrifolia) estas dika kiel niaj plej dikaj kukurboj. Kompatindaj ĝardenetoj de niaj Eŭropaj Kasteloj, kiel vi ŝajnas malgrandaj kompare kun tiu grandega parko, kiun al si Dio kreis en la Hinduja maro, kaj pri kiu zorgas nur suno kaj nuboj ! Solaj ambaŭ, tiuj eternaj ĝardenistoj naskas mirindaĵojn. La suno varmigas kaj al si altiras tiun potencon foliaron, kiun ĝi ne povas bruligi, ĉar la nuboj per preskaŭ ĉiutagaj pluvoj, konservas la piedon de l'arboj en malsekeco konstanta.

La ruĝa tero de Cingalujo estas ja mirinde fruktodonema. Per influo de tiuj grandaj artistoj, suno kaj pluvo, ĝi fariĝas, post kelkaj semajnoj, arboj kaj kreskaĵoj, floroj kaj fruktoj. Estas diversaj kanoj, kiuj en unu tago, pligrandiĝas je pli ol unu futo. Kaj kia potenca ĥemio, disigas la fruktodonan humuson kaj el ĝi forprenas, elektante, la partojn taŭgajn por ĉiaspeco de arboj ? La bananarbo, kiu ŝirmiĝas sub la kokosarbo, allasas al sia najbaro la sukojn, kiuj taŭgas por la nukso kaj konservas por si tiujn, kiuj taŭgas al la banano. La dismetiĝo de la nutrantaj ĉeloj, tiel diversaj en siaj efikoj, devas, mi supozas, prezenti ankoraŭ multe da misteroj al la plej lertaj scienculoj. Kaj tie ĉi, la laboraĵo plenumiĝas tiel rapide !

El la verko ; *Voyage autour du monde* (Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo) de *Mgr Pasquier*, Rektoro de la katolika Universitato, en Angers kun permeso de l'autoro tradukis E. GALARD.

MI INTERMIKSAS !

Les Aubrais.... oni haltas kvin minutojn !.... Bufedo!... La vojaĝantoj por Orléans, Gien, Montargis devas eliri el la vagonoj.... La vojaĝantoj por Vierzon, Bourges, Limoges, devas trafi alian vagonaron ! La vojaĝantoj por Paris, tuj ekve-

Ĉiu abono estas pagota **KOMENCE**, ne **FINE** de l'jarabono.

turos !.. Les Aubrais !.. La voyaĝantoj por Orléans, Gien, Montargis, kaj tiel plu, kaj tiel plu...

Kaj, dum la kondukistoj kaj aliaj oficistoj de la fervoja Kompanio, per voĉo trumpétanta, daŭrigas sian melopeon, la stacidomo bruas kiel abelujo je l'alveno de ĉefaj vagonaroj kaj, kva-zaŭ per kinematografilo, la voyaĝantoj rapidfluas laŭ-longe kaj laŭ-larĝe. La malfermataj pordetoj krakas, balanĉiĝas... amaso malpurigita de polvo eliras rapide el fakegoj. ; unuj, en vojaĝa vesto, malrapide detiras sin sur la bordmarŝejoj de la nigra konstruaĵo por momente malrigidi siajn krurojn... aliaj malrapidaj, eĉ flegmaj venas al la bufedo aŭ al la montra fenestro de la vendistino de ĵurnaloj... La plimulto trafas kiel torento sian novan vagonaron.... oni aŭdas la frazojn jenajn :

- Sinjorino, vi lasas vian sunombreton !...
- Atentu bone ĉiujn pakajojn !...
- Gastono, tien-ĉi ! gardu vin, friponulo !
- Kondukisto, la vagonaro al Limoges ?
- Sinjoro, vi puŝas min !...

Oni tuj alveturos Parizon !... Parizon oni tuj alveturos... ne sinjorino !... Aliflanken de la stacidomo ! Parizon oni tuj alveturos ! oni tuj alveturos !...

* * *

Kaj la pordetoj denove krakas forte, ĉar oni fermas ilin... ĉiu vojaĝanto, kiu autaŭe sidis en la vagonaro, reprenas sian lokon ; aliaj kiujn la vagonaraj kondukistoj rapidigas, febre serĉas la oportunan fakegon kie restas ankoraŭ bonaj auguloj :

Oni tuj ekveturos !... oni tuj ekveturos !...

Tri individuoj kiuj, ĝis la lasta momento, restis sur la stacidoma bordmarŝejo kaj ŝajne ne konas sin reciproke, en fakegon de la dua klaso kiel ŝafoj ensaltegas ; jen ekfajfas raŭke la lokomotivo... la maŝino faras sian siblan *pfuit, pfuit* ! la radoj grincas ; la vaporospiregas kiel sufokiĝanta besto ; la vagonaro ekimoviĝas... oni foriras... oni estas foririnta...

Ĉiu aboninto povas sendigi specimenon senpage al persono abonbla.

En la vagono, kiun atakis la tri tro malfrue alvenintoj, sola sidis vojaĝanto kiu estas vendisto de ĉevaloj. Tiu ĉi havas ne maldikan vastkorpecon kaj sensignifan vizaĝon elvokanta tamen la konfidon; liaj manoj estas largaj kaj lia ventro ronda kiel barelo de brandio; la kapo ŝirmata per ĉapelo kiun oni multe ŝatis, kiam regis la unua imperiestro, kaj nature provizita per grasa nazo, li estas el tiuj ĉi pri kiuj oni povas certigi:

Nu! tiu verŝajne ne eltrovis la supon kun bulbo!...

Tamen io malagraba povis maltrankviligi: la paro da malgrandaj grizokuloj, moveblaj, akraj kaj penetrantaj kiuj ekflamiĝis sub densaj brovoj.

* * *

Unu el tri subite enirintoj sin turnanta al tiu, kiu eniris poste ekpetis kun simplanima maniero

— Pardonu, sinjoro, ĉu vi alveturos Parizon?

— Jes sinjoro.

— Mi ankaŭ. Post du horoj ni estos tie.

— Estas io mirinda la vaporo!

— Jes, sed du horoj estas ankoraŭ longa tempo!

— Precipe se oni havus nenion por fari, sed nur sidiĝi sur la kusenoj de la fervoja Kompanio.

— Se mi jonglus per ludkartoj por pasigi la tempon?...

— Kun plezuro... vidu ni?

— Ĉu vi permesas ke mi ekrigardu, aldonis la tria alveninto.

— Kial ne?

Kaj la tiele ĵus parolinto malvolvis ĵurnalon sur siajn genuojn, eltiris el sia poŝo tri ludkartojn tre uzitajn kaj ekdiris

— Vi vidas, jen la reĝo de karoo, la sep de piko kaj l'aso de treflo. Estas ne malfacile, mi tuj antaŭ viaj okuloj miksos la ludkartojn kaj la afero estas ke vi devos sciigi min kie la reĝo kuŝas.

— Ne estas ruze!

— Ĉu vi tiel pensas?... nu, ni vidos!

Pro pagigo per poŝto au banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

La jonglisto tiam komencis miksi la ludkartojn, ilin pasigi rapide unu super la alian, kaj kunmiksi ilin pli kaj pli rapide; pasu, mia belulino!... unu, du, tri!... atentu vi, jen ĝi eksaltas!... nu ĝin ree... atingas; unu, du, nek vidate, nek konate, mi intermiksas!... Poste, en linion metanta la ludkartojn kies nur la postflanko estas videbla:

— Diru vi pri la reĝo, kie kuŝas lia karto?

— Jen estas ĝi.

— Ĉu vere? efektive, vi estas prava!... Nu, prosperis al vi diveni!

— Prosperis al vi diveni? Sed mi ĉiam divenos!

— Mi vetas dudek frankojn ke vi trompiĝos.

— Konsente!...

Kaj la ludo rekomenciĝis, unu, du, trifoje... kaj la jonglisto ĉiam malgajnis: en unu kvarono da horo li elspezis sesdek frankojn...

* * *

La vendisto de ĉevaloj iom post iom alproksimiĝis... Komence li silente rigardadis, sed baldaŭ montris la plej vivan intereson pri la ludo kaj, ĉiufoje kiam la fatala ludkarto estis ĵus eltrovita, li ekridegis... fine li ekkriis: — ne estas ruze! nenia dubo estis ebla!...

La okuloj de niaj tri vojaĝantoj rapide ekrenkontiĝis...

Se la Sinjoro dezirus ludi?... diris tiu kiu tenis la ludkartojn, sendube li ne sukcesus tiel bone kiel vi...

Nu bone!... aldonis simple nia vendisto, mi tuj povas ankaŭ riski dudek frankojn.

— Se tiel estas, vi tuj divenos!

Kaj la ludkartoj denove turniĝadas kiel aŭtunaj folioj per norda vento pelataj... la jonglisto tamen ŝajnas pli kaj pli malsperta kaj, ĉu pro laciĝo? ĉu pro timemo? lia ludo fariĝas ne lerta. De tempo al tempo oni ekvidas la barbhavan vizaĝon de reĝo de karoo, tial ke nia vendisto povas tuj ekdiri

Rememoru la PREMION promesitan al tiu, kiu varbos UNU abonanton.

— Jen estas ĝi !

Kaj oni povis tion antaŭvidi, li ne trompiĝis

— Sinjoro, diris la malgajnanto kun eksterordinara ĝentileco, vi gajnis sekve jen estas la dudek frankoj. Vi facile gajnis, ĉu vere ? mi certigas ke vi multe pli ŝvitas por gajni dudek frankojn per via profesio... fine, se al vi plaĉus daŭrigi...

— Tute ne !

— Kial ? sed vi devas permesi ke mi provu nun gajni.

— Mi ne kontraŭdiras... malgraŭ tio mi ĉesigas la ludon !

— Ha ! sed mi ne konsentas kun vi ! Sinjoroj, kion do vi pensas pri tio ?

Kaj la tri kunuloj, kvazaŭ ili pro virta sentemo indignus, komencis koleri, kiam la vendisto de ĉevaloj kun la kiel eble plej senkulpa mieno :

— Viaj dudek frankoj, ruzulo, sed atente vi rigardu kie ili kuŝas !... tie en mia profunda poŝo... neniam ilin vi revidos. Mi ilin gajnas, ilin mi tenas !... Kaj se vi intencus fanfaroni vian faron, mi tuj diros ke mi ne estas tiel malsprita kiel oni povas pensi... Cetere mi konas vian ludon kiu estas hontinda trompo, kaj vi estas tri kunkulpuloj kvankam ŝajne vi ne konatiĝas kune... La unuan fazon kiam oni ludas kun vi oni gajnas, eble por allogi, sed poste oni ĉiam malgajnas... Mi tion scias, ĉar oni jam senigis min per tia ludo... Nun se plaĉas al vi akcepti konsilon de mi, vi estu pacemaj aŭ oni vin arestos je la eliro el la fakego.

Se la parolado de vendisto de ĉevaloj estas mallonga, la vendisto mem havas du pugnojn ŝajne fortajn... Parizo ne estas plu malproksime... La singardemaj jonglistoj je l'eniĝo en la stacidomon malaperis :

Konfuzaj, kiel vulpo kaptita de kokino, klinanta la orelojn kaj premanta la voston. Dume la vendisto de ĉevaloj, kies buŝo fendigis gis la oreloj pro multesona ridego, frotis siajn manojn rave : Ĉar trompi trompanton duobligas la plezuron.

Esperantigis A. Denoncin. JEAN DES TOURELLES,
Represo malpersata.

Sendu HODIAU vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

LA PUNO (*Sekvo*)

LEGENDO ORIGINALE VERKITA DE LUIS CARLOS

Sed tiu lasta ne moviĝis, Jen ili estas unu antaŭ la alia, intersendante minacajn rigardojn. La vidiĝo de la nigra vireto estas tiel akra kaj stranga, ke maltime de Johano ĉesis : kaj per voĉo pli afabla, li alparolis la veturanton.

— Kompreneble, en tiaj momentoj, ĉiu homo povas malpacientiĝi, nenion gajninte dum tuta tago ; sed se vi pagus altan prezon, mi estus preta fari servon al vi

— Nu ; vi do gajnis nenion hodiaŭ ? Diris la nigra vireto, mi gajnios al vi bonan sumon.

Malfermu vian kaleŝon, por ke mi povu enmeti mian pezan pakajon, kaj poste mi eniros mem. Mi sidiĝos apud vi ; mi havos sufiĉe da loko. Nun, rapidu, staru apud mi, kaj ni ekveturu.

Konfuza timo kaptis Johanon ; li diris

— Mia ĉevalo estas malsana, kaj nun malfruiĝas. Ŝajnas al mi, ke estus pli bone iri hejmen, ĉar ni ambaŭ bezonas ripozon.

— Ni ekveturu respondis la nigra, vireto, enirante kaj sidiĝante sur la seĝon.

— Mia ĉevalo ne povos paŝi ! Baldaŭ estos noktomeze, re-diris Johano ; kaj vi tre bone scias, ke veturila prezo pliiĝas post tiu horo ; sekve pro tia malfrua horo vi devos pagi al mi duoblan prezon.

— Ni ekveturu !

Johano estas devigata aranĝi la jungaĵon de la ĉevalo kaj levigi ĝin, kaj kontraŭvole li sidiĝas apud la stranga veturanto.

Preninte la kondukilojn, li ekdemandas !

— Kien ni iras ?

— Kien ni iras ! Tio estas sensignifa por vi, ĉar mi pagos pohore ; alveturu la najbaran arbaron, kaj poste mi montros al vi la ĝustan vojon.

Johano svingis sian skurĝbastonon al ĉevalo, sed tiu ĉi, ordinare obeema, rifuzis ekiri. Plie lia mastro vidas, post kel-

Ne forgesu uzi la Abonilon enmetitan en la decembra N-o.

kaj minutoj, ke la besto ekscitiĝas kaj puffrapadas, blekas, antaŭlevas la naztruojn. Neniam ĝi montriĝis tia, kia ĝi estis en tiu okazo; Johano ektimanta krias:

— Ni haltu! mi ne povas ĝin autaŭnenirigi.

— Ekveturu! diris la nigra vireto; kaj preninte el la manoj de Johano la kondukilojn kaj skurĝbastonon supersvingis ĝin aeren, ektuŝetante la orelojn de la ĉevalo, kiu tuj ekkuris galope, kun rapideco supernatura. Tio ne estis la sola fimo, kiu premis Johanon; ĉar de tempo al tempo, li eksentis, ke la pakajo de lia kunulo moviĝas. Eĉ, unu fojon, li kredis ke li aŭdis plendajn voĉojn elirantajn el tiu sako, kaj ŝajnas al li ke aŭdiĝas eligantaj paroloj

— Je la eterneco! Je la eterneco!

Liaj haroj stariĝas; lia sango frostiĝas pro teruro. Post momento, el la stranga pakajo eliras mallaŭtan sonon ploran, kvazaŭ iŭ ĝemis:

— Kompaton! kompatu al ni!

Dume la nigra vireto, trankvile fajfis, kun plektitaj manoj sur la bru-to, kaj balancadis la kapon.

Ree la strangaj sonoj aŭdiĝas kun neesprimebla malesperanto:

— Je la eterneco! Je la eterneco!

— Kion tio ĉi signifas? ekkrias Johano, skuante la nigran vireton, kiu ne turninte la kapon, respondis:

— Ekveturu!

— Mi ne faros paŝon plie! Jam de du horoj ni veturadas kaj la arbaro malmulte alproksimiĝas. Mi ne scias kiel ni atingos la celon, kaj plie mi ne ŝatas tiun arbaron.

La strangaj sonoj, elirantaj el tiu pakajo, kredigas al mi ke mi estas sub la influo de demono, kaj nekredinda mistero. Mi rifuzas veturi plie.

Ni ekveturu!

— Ne! ekkriis kolere Johano, mi ne veturos; sed dirante tion, li tiel surtiris al li la kondukilojn, ke tiuj rompiĝis; mal-

Multaj abonoj komenciĝas en januaro. Vidu la daton de via abono.

graŭ tio la veturado fariĝis iom pli rapida kaj stranga.

Johano estis elironta el la kaleŝo, kiam la nigra vireto turnis al li la kapon kaj lin rigardis en la okulojn kun tiel flamantaj rigardoj, ke Johano ne kuraĝis eliri.

— Ne estas dezirinda, ke dungita veturigisto min forlasas vojirante; se vi intencas tion, mi enfermos vin en mia pakajo. Dirante tiujn parolojn la mistera veturanto ekfrapis per la piedoj la diritan pakajon. Korsirantoj plendoj eliris

— Je la eterneco! Je la eterneco!

— Krime fariĝis! haltu! haltu! ekkriis terurigita Johano mi volas eliri! vin forlasi! mi ne volas fariĝi via kunkulpulo!

— He! Johano, ekridis la nigra vireto, vi estas nun timulo; tamen, vi ne estis tia, iam; jes, vi ne estis tiel skrupulema... Efektive, kiam, ian vesperon, maljunulino envenis vian kaleŝon, kaj kunportanta kun ŝi grandan sakon sur siaj genuoj, petis ke vi konduku ŝin al najbara vilaĝeto; jes, tiajn skrupulojn vi ne havis, sulfokinte ŝin per streĉita naztuko; vi ne kompatis al ŝi, kvankam tiu maljunulino proponis al vi, por sia savo, siajn trezoron. Ŝia turmento daŭris du longajn horojn, dum ŝi baraktis kontraŭ sia mortiganto.

— Malvere! estas malvere!

— Poste, daŭrigis la nigra vireto, ne atentante la parolojn de lia apudestanto, vi fosis malsupre de arbo, grandan kavon, enmetis en ĝin la ŝtelitan trezoron, kaj faris specialan signon sur tiu arbo, por pli bono ĝin rekoni kaj facile retrovi vian akiraĵon.

Farinte tion ĉi, vi rekondukis en la urbon la maljunulinon dirante, ke subita atako ŝin premis kaj mortigis; tio estis bone elpensita, kaj neniu suspektis pri tio. Ja, mirinda elpensajo, ĉu ne vere, Johano?

— Silentu! silentu! mi iros kien ajn vi volos!

— Bone, bonege, vi trankviliĝas; bedaŭrinde tro malfrue; hodiaŭ mi estas babilema, bonhumora, kaj mi rakontos al vi aliajn spritaĵojn kaj elpensajojn faritajn de vi. Jes, mi klarigos

Uzu la ABONILON por varbi NOVAN abonanton.

kiamaniere vi fariĝis la ĝisnuna posedanto de tiu kaleŝo, nenion elspezinte !

Ha, vi malkvietiĝas, mi estos mallonga en mia parolado. Bezonante kvar mil *skudojn*, vi imagis alian sistemon. Via elpenŝaĵo estis tre lerta ; mi komplimentas vin pri ĝi. Ian vesperon, — kompreneble, vi agadis dum la vesperoj, kiel strigoj, timantaj la taglumon, — maljuna onklino, tre amema al vi kaj tre riĉa, (laŭ la publika famo, ŝi posedis grandan ŝtrumpon plenan de oraj moneroj) ; do ian vesperon, kiam ŝi estas supre de ŝtuparo, nevola ekpuŝo de vi faligis ŝin malsupren, kaj ŝi rompis al si la kapon ; okaza akcidento, diris kelkaj.

Dume vi tiel kriis kaj ploregis pra ŝia morto, ke ankoraŭ unu fojon neniu pripensis la okazintaĵon.

Jen, vi estas riĉa ; vi kaŝas provizore, en angulo, la multekostan ŝtrumpon, kaj vi ŝajnas tute mirigita kiam oni informas vin, ke vi estas la heredanto de ŝi. Vi ne havis skrupulojn, ĉu ne vere, Johano ?

La nigra vireto ridegis laŭte, kaj Johano estis pli kaj pli terurigita ; la misteraj voĉoj ĝemegis kaj ripetadis :

— Je la eterneco ! Je la eterneco !

— Sekve de tiu heredo, vi aĉetis per ĝi la nunan kaleŝon de via malnova mastro kaj lian ĉevalon. Konkludante la vendon, vi kalkulis antaŭ li la brilantajn *skudojn*, kaj vi ekbedaŭris ilin ; el tio envenis en vian kapon nova elpenŝaĵo. Jes, tiu ora muziko sonadis al viaj oreloj ; kaj post la pago, vi proponis al li konduki lin hejmen : Tiu malfeliĉulo akceptis, kaj baldaŭ kuŝis en la fundo de la kaleŝo kun kapo frakasita de skurĝbastono.

Por kredigi akcidenton, vi elveturigis la malvivulon, kaj, renversis la veturilon sur bordo de la kruta monto, kaj rapidis reeniri la urbon sciigante, ke malfeliĉo okazis ĉe vojkruciĝo. Jes, vi havas elpenseman spiriton, kaj vi sukcesis fariĝi posedanto de la enviita kaleŝo.

— Silentu ! silentu ! ĝemegis Johano.

— Mi finos ; mi ne volas vin tedi pli longe, ĉu vi aŭdas tiujn

Ĉiu abono estas pagota **KOMENCE**, ne **FINE** de l'jarabono.

ĝemojn ; precipe ili vin interesas. Estas tiuj de via bona, dolĉa estinta edzino. Jam pasis du jaroj, de la nokto, kiam ŝi estis ripozanta en lito, vi ŝin sufokis per kapkuseno. Nun, vi estas, edziĝonta ian vidvinon, posedantan kvar kaleŝojn ; ŝi amas vin, ĉar ankaŭ ŝi estas tiel malvirta, kiel vi, kaj je samaj di-boĉaj moroj.

Vian apetiton grandigas via monavideco.

Sed, estis tempo haltigi vian ĝisnunan vivadon, ĉar ĉiuj rimedoj malebliĝos ; efektive, mi estus tre danka al vi, se vi ek-konigus viajn novajn elpenaĵojn. Kial vi silentas ? Nu, parolu ?

Johano ne respondis. Malpreciza espero naskiĝisen lia kapo. Ja, li pensis en si mem, mi estas sub regado de ia demono arba aŭ monta, baldaŭ venos la matenruĝo, kaj tio forpelos la malbonan spiriton.

Efektive, el la foro¹ vidiĝis grandiganta eklumo ruĝa, sed la rebrilo de tiu ĉi ŝajnis funebra ; ĝi ne posedis la tiel belajn kaj delikatajn matenruĝajn kolorojn ; tio estis kvazaŭ dombrulada rebrilo.

Iom post iom, la lokoj fariĝis videblaj kaj Johano ekvidis grandegan kavernon, el kiu eliradis grandoj flamoj. Rapida kiel sago, la kaleŝo, post kelkaj sekundoj, staris autaŭ la enirejo de tiu stranga kaverno.

Johano vidis, denove, kun grandiganta timo, fantomon, kun malpalega kaj blua vizaĝo, staranta maldekstre de la kaleŝo : tio estis lia sufokita edzino. Dekstre, staris alia fantomo kun akraj kaj flamantaj okuloj : tio estis la maljunulino. Tria fantomo, kun mallevita kaj frakasita kapo, ĉirkaŭvolvita per blanka tuko, ekprenis la kondukilojn, kaj mokeme ridetis Johano rekonas sian malnovan mastron.

Malrapide venis alia kvara fantomo, kies membroj estis dis-

1. Ordinare oni diras : *malproksimo*. La vorto *for* povas ja fariĝi substantivo.

Ĉiu aboninto povas sendigi specimenon senpage al persono abonbla.

pecigitaj, kaj balancadis je ĉiuj flankoj sian kapon, laŭtege kriante :

— Mia kara nevo ! mia kara nevo, mi deziras al vi bonan nokton kaj bonvenon. Multaj aliaj fantomoj kaj demonoj alvenis, dancante kaj saltante.

Elirinte el la veturilo, la nigra mistera veturanto alpaŝis al ili kaj laŭtege, ordonis, ke ili helpu al li por preni el la veturilo la pezan pakadon.

— Rapidu, ĉar mi devas pagi duoblan prezon, kaj jam kelkaj horoj forpasis, li diris.

Du demonoj alproksimiĝis la kaleŝon kaj prenis pezan nigran pakadon ; poste ili metis ĝin antaŭ la enirejo de la kaverno. Subite, eliras el ĝi pala animo de junulo

— Kion do mi faris al vi ? li ekkrias ; kial mi estas sub via regado ? Pri kia krimo oni kulpigas min ? Mi estas senkulpa !

— En nenio vi estas suspektinda ; vi nur estis honesta laŭ la leĝo, sed en realeco, vi iam malbone agis, insidinte por kapti heredaĵon ne difinitan por vi, kaj senigi la verajn heredantojn.

For al fajro eterna ! je la eterneco !

— Al fajro eterna ! je la eterneco, ripetadis la demonoj, svingantaj iliajn malbelegajn vostojn, kaj ili ĵetis en kaverton la junulan animon. Tuj grandegaj flamoj moviĝis en la kaverno.

El la pakado, ree oni eltiris sinsekve, juĝistan animon, pro kondamno de senkulpa fraŭlo, kies fiancino mortis pro ĉagreno ; advokatan animon, pledintan maljuste proceson ; profesoranimon, kiu instruis malveraĵojn kaj sciencan nekonitan de li ; mastran animon, kiu donis malbonajn ekzemplojn al siaj geservistoj ; drinkejmastran animon, kiu venenigis siajn klientojn por pli rapide riĉiĝi ; kaj fine, sendankemulan animon, kraĉintan al vizaĝo de sia bonfaranto.

— Nun, ekkriis la mistera veturinto, kiam la pakado estis malplena, mi devas pagi mian veturigiston. Vi estis tiel skrupulema, ke mi ankaŭ estos tia, kia vi estis. Do, mi pagos duoblan prezon. Ja, Johano, vi estos pagata duoble ; ĉar la damna-

Pro pagigo per poŝto au banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

toj nur suferas korpe, ĝis la tago venos, kiam mi posedos ilin anime ; vi, Johano, suferos ambaŭ turmentojn, kaj fraprante la ŝultron maldekstran de Johano per forkego, li parolis tiujn vortojn :

— Estu lia korpo ne putrebla ! ĝi suferu ne difektigebla ! ĝi ricevu eterne batojn de niaj mordantaj vipaj ledrimenoj diamantaj ! Li veturu eterne kun siaj apudestantaj mortigitoj !

Johano falis surgenu, kriegante, petante pardonon, kompaton.

— Malkuraĝulo ! ĉu vi kompatis al viaj suferintoj ! Ja, mi estus malsaĝa vin elaŭskulti ! Ne ! ne ! vi estas autaŭdifinita de la dia volo, kaj mi ne devas malplenumi mian volon ! kaj tiu kaleŝo, ilo senkonscia de viaj krimoj, fariĝu por vi bruliga fera turmentilo ! apudestu ĉirkaŭ ĝi ĉiuj viaj suferintoj ! kaj ekveturu ! Je la eterneco !

La kaleŝo ekveturis kun Johano kaj la ĉirkaŭantaj fantomoj, kiuj ekkriis :

Je la eterneco ! Je la eterneco !

La kaleŝo malaperis en la senfunda kaverna ; kaj la mistera nigra veturinto subite enprofundiĝis en la teron, dissendante ĉiufanken sulfuran odoron.

De tiu tempo, la monto, kie okazis tiu aventuro, estas dezerta kaj neniu kuraĝas supreniri ĝian krutan deklivon, timante fariĝi akiraĵo de demono aŭ malbona spirito. Dum la someroj, kelkajfoje, el ĝia pinta supro eliras fumoj, kredeble, devenantaj de malnova vulkana kratero.

Tia estas la Lombarda legendo, eble grandigata, jaroj post jaroj, de la San-Rafaelanoj.

Originale verkis. LOUIS CARLOS.

Rememoru la PREMION promesitan al tiu, kiu varbos UNU abonanton.

ŜAKOJ

(Sub la relakcio de John Ellis, el Keighley (Anglujo).

LUDO 9a

Ludita inter du unuaklasaj anoj de « City of London » ŝak-klubo, en la konkurso por la estreco de la klubo.

DUĈEVALA VIENA Ludkomenco.

BLANKO	NIGRO	BLANKO	NIGRO
C.-J. Woon.	A.-F. Mercer	19. K — 4D	Ĉ × S
1. S — 4R	S — 4R	20. Ĉ × Ĉ	
2. Ĉ — 3KR	Ĉ — 3KD	La 22-a iro de Nigro pruvas, ke tiu ĉi iro estas nebone elpensita.	
3. K — 4K	Ĉ — 3K		20 K × T
4. S — 4D	S × S	21. Ĉ — 5Ĉ	K × S
5. Ĉ × S	Ĉ × Ĉ	22. D × SĈ	K — 4R
6. D × Ĉ	S — 3D	23. K — 3R	
7. Ĉ — 3K	K — 2R	Kompreneble, K × K tuj perdos pro D — 4K (ŝ) Se Ĉ × S, K × K; 24 Ĉ × K, D — 4K (ŝ) R — C. La lasta iro de N. gajnas en ĉiuj variacioj.	
8. Reĝsaltas	Reĝsaltas		23 T — 3K
9. K — 5ĈR	S — 3K	24. D × SK	D — 2K
10. TD — 1D	Ĉ — 1R	25. D × D	K × D
... Bonega iro en ĉitiaj situacioj.		26. T — 1R	K × S (ŝ)
11. K — 4K	K — 3R	27. R × K	T × K
12. T — 2D	D — 3Ĉ	28. T × S	S — 3TR
13. D — 3D	T — 1D	29. Ĉ — 3K	T × SK
... Kapti la DĈS-on estus ne prudente.		30. T — 7R	S — 5D
14. K — 3R	D — 4T	31. T × ST	S — 6D
15. S — 4K	Ĉ — 3K	32. S — 4Ĉ	S — 7D
16. K × K	S × K	33. Ĉ × S	TD × Ĉ
17. D — K	S — 4D	34. S — 5Ĉ	T × (ŝ)
18. D — 3Ĉ	K — 5Ĉ	35. Ĉedas	

Avizo. — La gazetoj Esperantistaj estas petataj presigi la sekvantan noteton :

La Esperantistoj, kiuj ŝatas ŝakludon estas rememorigitaj, ke fondiĝis, dum la Ĝeneva kongreso, **Societo da Esperantistaj Ŝakludistoj**, kies Prezidanto estas S-o Em. Peltier, kaj Sekretario S-o John Ellis (Keighley, Anglujo), La kolizaĵo (5 fr. ekster Franc., kaj 4 fr. en Franc.), estas la abono al *Espero Katolika*, kiu estis elektata kiel oficiala organo de la Societo. — La gazeto jam de tri jaroj publikigas ŝaklecionojn, ludojn kaj problemojn, en kiuj troviĝas plena terminaro ŝakluda. — Sin turni al la Sekretario por enskribo en la Societo, — Oni preparas ŝakturniron por la Tria Kongreso.

Sendu HODIAU vian abonpagon per poŝtmandato (franca au internacia).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio: Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro: Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

JUNA ESPERANTISTO, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono: 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ: S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj sribi por pluaj sciigoj al la Direktoro:

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO

NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS.

AKCEPTAJAJ SAMTEMPE

(10-4)

PENSIO POR GESINJOROJ: GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

SOCIETO DE ESPERANTISTAJ ŜAKLUDISTOJ, fondita dum la Ĝeneva Kongreso. — Prezidanto: Em. Peltier, Direktoro de E. K. — Sekretario: S-o John Ellis, en Keighley (Anglujo). — Kötizaĵo: 5 fr. (4 fr. en Franci.) donas rajton ricevi E. K., oficialan organon de la Societo. — Ŝakturniro prepariĝas por la tria Kongreso. — Sendu aliĝojn al la Sekretario.

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*) Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P-o Em. Peltier. Eldonita de Pariza firmo Bloud.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francel.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Eskter Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K. — Specimenon senpage.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOF. — Ce Hachette k. K^o Paris. — Jare, Francujo 1 fr. 6 ; ceteraj landoj Fr. 7.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, la plej malnova gazeto (1895), eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono : 5 fr. — Kun Literatura Aldono : 7 fr. 50. Specimeno senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco, industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝejoj.

Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesorò A. DOMBROVSKI (2-a aldono.) 0 fr. 65

Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI..... 1 fr. 80

(Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

PREĜARO (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun

ekpresigas (por la subskribintoj)..... 3 fr. »»
Unua kajero (por ne-subskribintoj) 2 fr. 50

EN PRESADO : *Hebrea Kalendaro*, 16-paĝ. broŝuro, de Pastro Jakobo BIANCHINI. 0 fr. 20